BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

CGC Nº
00406 504/0001-06

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

OKTOBRO/1982 BOLETIM INFORMATIVO Nº 73

## CENTJARIĜO DE ESPERANTO

### Konkurso kaj premioj pri jubilea afiŝo

Dum la preparoj por la 100-jara Jubileo de Esperanto en 1987, tra la venontaj jaroj, ni certe povos atendi amason da homoj, kiuj unuafoje serĉas informojn pri Esperanto. Sed ni ne nur trankvile atendu. Kial ni ne mem agu por estigi tian lavangon da informpetoj?

Tio estas unu el la celoj de la jubilea programo: "vaste pligrandigi la nombron de simpatiantoj al Esperanto".

Por ke kresku la nombro de informpetoj, devos kreski ankaú la nombro de informiloj. Interalie, Universala Esperanto-Asocio sentas la bezonon de nova afiŝo, ĝenerale utiligebla en klubeoj, publikaj lokoj, budoj, standoj, eble eĉ - se ĝi estas sufiĉe alloga - en la dormoĉambroj de junaj entuziasmuloj. Tial UEA jam lanĉis konkurson pri nova afiŝo, lige kun la programo por la Jubileo, kies regularo estas jena.

ENHAVO

La afiŝo celu veki la intereson de iu, kiu neniam - aŭ apenaŭ aŭdis pri Esperanto. Ĝi prefere havu lokon por aldoni adreso(j)n.

TEKNIKAJ DETALOJ

La afiŝo povas esti plurkolora. Ne estas apartaj limigoj pri grandeco. La grafikaj elementoj devas esti jam pretaj - do UEA ne povas akcepti ideojn, kiuj postulas ankoraŭ detalan teknikan prilaboron. Tio signifas, ke esperantisto deziranta partopreni la konkurson prefere petu la helpon de neesperantista grafikisto, se tio necesas. Oni ankaŭ povas instigi neesperantistan artiston rekte partopreni.

PREMIOJ

La plej bona afiŝo estos eldonita de EUA, kaj la gajninto ricevos premion de 1.000 nederlandaj guldenoj (pli malpli Kr$ 80.000,00). Kompreneble, UEA rezervas la rajton ne aljuĝi la premion, se la kvalito de la konkursaĵoj ne atingos la deziratan nivelon.

Apartan premion de Kr$ 20.000,00 aldonos Brazila Konsilantaro de Esperanto, kondiĉe ke la gajninto estu brazila civitano.

ADRESO KAJ LIMDATO

Sendu konkursaĵojn al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Ili devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31a de decembro 1982.

---O---

Brazila Konsilantaro de Esperanto, kunlabore kun UEA, petas al sia legantaro diskonigi ĉie la regulojn pri tiu konkurso, kaj se eble, traduki ilin por publikigo en la nacia gazetaro. Dankon.

BKE-KONGRESO EN BRAZILIO (03/05-12-82) - Korektante noton presitan sur la aliĝilo, ni avertas la interesatojn, ke aloĝoj al la kongreso estos akceptataj seninterrompe, eĉ post 1a 20a de novembro. Tamen, ne forgesu, post tiu limdato la kotiztabelo validos kun aldono de 50%.

## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Honora Prezidanto
Francisco de Souza Almada, Rua Galeão Carvalhal, 31, Ap. 73, BR 11100 - Santos - SP.

**Estraro**

**Prezidanto:** Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

**Vicprezidanto:** Nelson P. de Souza Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

**Kasisto:** José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília - DF

**Sekretario:** F-ino Lêda da Silva Gama, SOS 306-A 101,BR 70353 - Brasília-DF

**Kulturaj Aferoj:** Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

**Informa Bulteno**

Oficiala organo planita por monata apero.
Dissendo senpaga

RESPONDECAJ DIREKTOROJ: Carlos A. S. Cunha, Nelson P. de Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

## AŬ ĈIO, AŬ NENIO

Ordonema junulo kutimiĝis, ke oni tuj cedu al liaj kapricoj. Iam, renkontante belan virinon, li diras al ŝi:

– Mi volas amori vin.

– Ĉu ni iru en vian loĝejon aŭ en mian?

– Se vi nun komencas diskuti, ni ne plu parolu pri tio. Vi ne interesas min.

(El la libro Kruko kaj Baniko, de Louis Beaucaire)

## LA MOVADO VIGLIĜAS EN LA PARAÍBA-VALO

En la 17-a de oktobro kunvenis en Taubaté pli ol 50 geesperantistoj por debati pri la lastatempa vigliĝo de la Movado en la Paraíba-valo. Ĉeestis reprezentantoj el 8 urboj de tiu grava regiono, krom grupoj el Rio de Janeiro, São Paulo kaj proksimaj urboj. Ĉeestis Prof-ro Sylla Chaves, Prezidanto de BEL, S-ro Carlos S. Cunha, Prezidanto de BKE, S-ro Amarílio Carvalho, reprezentanto de KKE, kaj Prof-ino Elvira Fontes, Prezidantino de São Paulo E-Asocio.

En la antaŭtagmeza programo oni omaĝis la pioniron de la regiono, D-ron Waldomiro B. Abreu. Poste, okazis vigla debato pri la maniero disvastigi E-on en la regiono, kun speciala emfazo pri modernaj presaĵoj, diskoj, k.s., ne forgesante la gravecon kapti la okazojn pri personaj kontaktoj ĉe kulturaj instancoj.

La posttagmeza debato celis analizi la aktivigon de la jam ekzistantaj E-istoj. Oni konstatis la ekziston de pluraj izolitaj samideanoj aŭ etaj rondoj, por kiuj urĝas organizi reton por kunlaborado kaj fortosumo. Elstariĝis la koncepto, ke prioritate estas prepari kiel eble plej multe da homoj kapablaj kompetente instrui E-on en elementa nivelo. Por tio, oni tuj konsentis pri perfektiga kurso en Taubaté, fare de spertaj samideanoj el São Paulo.

Dum la renkontiĝo, oni anoncis la ĵusan fondon de TEKJ (Taubaté E-Klubo Junulara), sub la prezidanteco de Marcelo W. Paiva kaj la formiĝon de komisiono por pristudi kaj efektivigi la reaktivigon de Taubaté E-Klubo, kun elstara partopreno de S-ro Juvenal T. Silva, D-ro Alcyr G. Almeida kaj S-ro Eurico Figueira. Tiamaniere, Taubaté fariĝas speco de centro de la strategia regiono Paraíba-valo, atendanta apogon, vizitadon kaj instigon de la brazila E-istaro.

**Raportis D-ro Paulo Sérgio Viana**

# BRAZILAJ NOVAĴOJ

## FEDERACIA DISTRIKTO

● La III-a Jarkongreso de BKE okazos de la 3a la 5a de decembro, en Brazilio. Aliĝu tuj, bonvolu! Tre gravas por la Movado via aliĝo!

● Pligrandiĝis lastan monaton la anaro de nia Asocio; jen la nomoj de la novaj individuaj membroj, kies apogon ni kordankas: Gomercindo Dias Nunes (RJ), Newton Fonseca de Barros (SP), Luiz Teixeira da Silva (MG), José Roiz Oliveira (MG), Francisco André de Paula Canavezzi (SP), Carlos Maria (DF), kaj Maria das Dores Góes de Oliveira (DF). Oni menciu ankaŭ la E-Klubon de Montes Claros (Praça Dr. Chaves, 32 - BR 39400 - Montes Claros), kiu estas la plej "juna" BKE-membro Kategorio "A".

● BKE faris specialan peton al diversaj Ambasadoj por donaco de Esperantaj libroj al la Biblioteko de la Ĉambro de Deputitoj. Sed kredeble tion povas pli facile sukcesigi petoj de gesamideanoj aŭ de E-organizaĵo en ĉiuj landoj, kie estas E-eldonaĵoj. Ĉu vi povas helpi?

## GOIÁS

● En la urbo Iporá, de la 26a ĝis la 30a de januaro 1983, okazos la V-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, organizota de BEJO kaj Iporá Esperanto-Klubo. D-ro Elias Araújo Rocha patronos la eventon, kiu havas kiel Honora Prezidanto la urbestron de Iporá, D-ro Manoel Miranda.

## MINAS GERAIS

● Ouro Preto estos la sidejo de la XVI-a Brazila Seminario de Esperanto, en Julio venontjare, laŭ informo de s-ano Onésimo Costa e Faria, prezidanto de Instituto Esperanto de Educação (R. Guajajaras, 410 s/809, BR 30.000 Belo Horizonte), kiu preparas la eventon kun la tradicia organizanto: Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Caixa Postal 1887 - BR 20.031 Rio de Janeiro-RJ). La aliĝo kostas Cr$ 1.500,00 ĝis la 28a de februaro 1983; post tiu limdato estos Cr$ 2.000,00.

● Du spiritistaj institucioj organizas bibliotekon kaj petas librojn: Centro Espírita Saulo de Tarso (R. Biquinhas, 301) kaj Grupo Espírita Luiz Mauro Santos (R. Tiradentes, 347). La poŝtkodo de ambaŭ estas 39100 - Diamantina-MG.

● Urba Komunumo de Uberlândia (Prefeitura Municipal, 38400-Uberlândia-MG) eldonis belan albumon pri la urbo. Oni povas ĝin peti kaj ricebi senpage, kaj antaŭ ĉio oni devas instigi por Esperanta eldono.

## RIO GRANDE DO SUL

● Rondeto Nova Mondo (Trav. Tuiuti, 21, Poá, BR 90.000 - P. Alegre) uzas rektan metodon de Prof. Boris Eston kun simpla interparolo en Esperanto.

## RIO DE JANEIRO

● Centro de Consciência Contínua (C. Postal 70000 - BR 22422-Rio) en sia statuto - Art. 6a - instigas la membraron al "studado kaj divastigado de Esperanto".

● ALMANAKO LORENZ baldaŭ aperos por 1983. Societo Lorenz (C. Postal 3133 - Rio de Janeiro) anoncas specialan rabaton por antaŭmendoj.

● La 27an de oktobro 1982, en la aŭditorio de la Librovendejo Pasárgada, de Niterói, prelegis D-ro Mário Ritter Nunes, pri "Kio estas, kial, kiam kaj kie Esperanto?". La luksan invitilon por la prelego subskribis Academia Fluminense de Letras (al kiu apartenas D-ro Ritter kiel akademiano), Brazila Esperanto-Ligo, Niterói Esperanto-Klubo kaj la menciita Librovenejo.

● Sylla Chaves informis la Redakcion, ke li transdonos la prezidantecon de BEL la 20an de novembro. Amase ni ĉeestu la solenaĵon, por gratuli s-ron Chaves pro liaj bonaj servoj kaj samtempe ĉirkaŭbraki kaj prezenti bondezirojn al lia anstataŭonto, Kolonelo Fernando José Galvão Marinho, kiu estas individua membro de BKE kaj sindona E-batalanto.

## SALVADOR

● Ekde julio funkcias kurso de Esperanto en la spiritisma organizaĵo de Salvador, Círculo Unidade Fraternal (Frata Unuiĝa Rondo). Laŭ letero ricevita de nia tiea Delegito, S-ano José Saraiva Matos, tiun kurson gvidas D-ro Benito de Alcântara Figueiredo, multkonata juĝisto kiu brile agadas ĉe la Forumo de Salvador.

● Pro manko de spaco en tiu ĉi endonaĵo, ni rezignas publikigi tre interesajn amuzaĵojn (vortludojn) elpensitajn de José Saraiva Matos, kun la ĉefa celo elmontri la senliman riĉecon de nia Ligvo. Ni dankas sed pardonpetas.

● Ĉiujare, pro alveno de la printempo, Bahia Esperanto-Asocio organizas feston por kunfratiĝo de gelernantoj, profesoroj, aŭtoritatuloj ktp. La lasta organizita estis tre bela kaj tie oni trinkis "chopp", manĝis "caruru" kaj dancis. Laŭ informo de s-ano Roberto de Almeida Neves, en la momento ABE (tiu malgranda UEA en Ŝtato Bahia), danke al kunlaboro de ĉirkaŭ 300 personoj, serioze preparas ĉeestindan feston por la venonta Kristnaskotago.

## SANTA CATARINA

● La numero 3 de la informriĉa bulteno Antaŭen, oficiala organo de la Esperantista Asocio de Santa Catarina (Caixa Postal 460, BR 88.000 -Florianópolis) publikigis, ke per la Leĝo n-ro 6.105, de 15-07-82, la Ŝtato deklaris la publikan utilecon de EASC. La aŭtoro de la leĝoprojekto estas la Deputito Jorge Gonçalves da Silva, kiun ni varme gratulas, kune kun EASC, pro la grava okazintaĵo.

## SÃO PAULO

● Ene de la Palaco de la Poŝto en São Paulo, estis surmurigita jena mesaĝo, dum malfermo de ekspozicio tie inaŭgurita la 20an de oktobro 1982: "Ĉe la 60-a jariĝo de la Palaco de la Poŝto, Esperanto-Asocio de San-Paŭlo kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto varme gratulas la Brazilan Entreprenon pri Poŝto kaj Telegrafoj pro la konstanta pliboniĝo de ĝiaj servoj".

● La eldonejo "Amikoj de Esperanto", ligita al Esperanto-Asocio de San-Paŭlo jam enkasigis la sumon de Cr$ 417.500,00. Parto de tiu rimedo pagos la eldonkoston de iu planita vortaro, aperonta en februaro/marto 1983.

## III CONGRESSO DO CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

• PATRONO: Dr. Newton Egydio Rossi, Presidente da Federação do Comércio de Brasília.

• COMISSÃO DE HONRA: Dr. José Lins de Albuquerque, Senador da República; Profa. Eurides Brito da Silva, Secretária de Educação do DF; General Alfredo Moacir M. Uchoa, Presidente da UPIS; Cel. Fernando José Galvão Marinho, Presidente da Liga Brasileira de Esperanto; Dr. Braz Cosenza, Presidente da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; Prof. Francisco de Souza Almada, Presidente de Honra do Conselho Brasileiro de Esperanto e Prof. Geraldo Mattos, Membro da Academia de Esperanto.

• COMISSÃO ORGANIZADORA: Presidente - Carlos Augusto Siqueira da Cunha; Coordenadores Gerais - Nelson Pereira de Souza e Adolpho de Miranda Silva; Coordenador do tema "Esperanto Centenário" - Dr. Walter Augusto Francini; Coordenador de Divulgação - Reis de Souza; Tesoureiro - José Carlos Dorini Ramos; Auxiliares - Dayse Silva Miranda, Delamar Augusto de Assis, Fiorina Suevo de Souza, Herasmo Leite, Leda da Silva Gama, Marcello Vieira de Andrade, Mauro Gomes Azevedo e Néia Lúcia Souza.

## NOTAS VÁRIAS

• O Orador Oficial da sessão de abertura do III Congresso, no dia 3, às 20 horas, no auditório do Centro de Formação Profissional do SENAC, será o Prof. Dr. Paulo Vieira da Silva, da Universidade de Brasília.

• No mesmo dia 3, às 17 horas, haverá singela solenidade no Salão Verde da Câmara dos Deputados, onde será realizada uma exposição de livros e periódicos, inaugurando o acervo de obras em Esperanto na Biblioteca daquela Casa.

• O III Congresso pretende deflagar a Campanha do Centenário do Esperanto, que durante o próximo quinquênio vai estabelecer metas para que o Movimento Esperantista Brasileiro alcançe todos os setores de atividade, por exemplo, escolas de todos os graus, meios de comunicação e, muito especialmente, o turismo, a indústria e o comércio.

• O esperantista e nosso associado, Dr. Jorge das Neves, do Rio de Janeiro, lançará em Brasília o seu livro "Poesia dos Signos", durante o Congresso e sob os auspícios da Associação Atlética Banco do Brasil.

• O Departamento de Turismo do DF - DETUR apresentará um filme interessantíssimo sobre Brasília, comparando-a com a obra de Akhnaton, no Egito Antigo.

• A Cia. Nestlé distribuirá durante o Congresso, gratuitamente, alguns de seus produtos, como Nescafé, Nestea, balas, biscoitos, etc.

• No encerramento do Congresso se pretende realizar um passeio de barco pelo Lago Paranoá, com ligeira refeição a bordo.

• O time de futebol de salão dos esperantistas de Brasília está desafiando adversários, pois teremos a quadra do SENAC à nossa disposição.

• Haverá um Bazar de Esperanto, numa loja no centro da cidade, para a venda de livros e outros artigos em benefício das entidades esperantistas que desejem participar. Esse bazar funcionará durante e uma semana após a realização do Congresso.

• Graças à atuação do Coordenador de Divulgação, jornalista Reis de Souza, foi feita a doação de 1.000 cartazes pela Revista Brasília e estamos encetando intensa campanha junto ao Comércio, Bancos e Órgãos Oficiais, para a organização de um quadro de patrocinadores e colaboradores do III Congresso do CBE.

• A Imobiliária Ideal, de propriedade do esperantista, Sr. José Romão, patrocinou a impressão de 5.000 folhetos de divulgação do Congresso, já distribuídos a todos os endereços constantes de nosso fichário.

• O Grupo de Imprensa, com a participação da diretora secretária do CBE, Srta. Leda da Silva Gama, da jornalista Eliane Menezes e do jovem Herasmo Leite, tem feito grande divulgação do evento. Dentre outras atividades, já foi feita uma entrevista no Canal 8 da TV (que em breve realizará uma mesa redonda em horário nobre) e extensa nota no Jornal de Brasília.

• Junto à Polícia Militar do Distrito Federal o Congresso obteve alojamento para 50 pessoas, restando apenas poucas vagas, na data em que preparávamos esta edição.

• Agora que todos estão bem informadinhos e informadinhas, ousamos perguntar: Você já se inscreveu para o Congresso, mesmo não podendo comparecer? Ah! vai fazê-lo agora? Então bola branca pra Você. Seu apoio é importantíssimo para a consolidação do movimento esperantista brasileiro.



## TRA LA MONDO

### ANTVERPENO

• La 28 an de julio, dum la 67a UK, fondiĝis la Dentista Sekcio de Universala Medicina Esperanto-Asocio, danke al longdaŭra klopodo de D-ro B. Szemok. La nova Sekcio invitas ĉiujn fakulojn en tiu scienca branĉo partopreni en la agado de laborgrupo, kiu celas: aliĝi al terminologiaj laboroj; instigi la aperigon de esperantligvajn resumoj en fakrevuojn; realigi amikajn kaj fakajn rilatojn inter la diverslandaj gekolegoj; kompili Stomatologian Enciklopedion; partopreni en la laboro de la medicinistaj esperantistaj fakgrupoj, ktp. Interesitoj kaj informpetantoj povas kontakti la ĝeneralan sekretarion: D-ro B. Szemok, H-2737 CEGLEDBERCEL, Pozsonyi ut. 2, Hungario aŭ la respondeculo por la tria mondo: D-ro Roberto Resende, Caixa Postal 04-0222, BR 70.312, Brasília-DF, Brazilo.

### KOLOMBIO

• Kolombia Esperanto-Ligo estas akceptita de UEA kiel ties 44a aliĝinta landa asocio. Nia organizaĵo ankaŭ preparas sian aliĝpeton tiucele, kaj verŝajne fariĝos la 45a, dum la venonta UK en Budapeŝto.

### UNUIĜINTAJ NACIOJ

• La jaro 1983 estas deklarita, de la ĝenerala asembleo de UN, "Monda Komunika Jaro: Evoluigo de Substrukturoj". Dum tiu jaro UEA dediĉos apartan atenton al la problemoj de komunikado, precipe en evoluantaj landoj kaj ĉefe rilate al la komunika teknologio.

### ALLOGA INVITO EL NEDERLANDO

• La Centra Oficejo de UEA serĉas novan oficiston, por la financa administrado de la Asocio. Taskoj inkluzivas planadon, budĝetadon, pretigon de spezkontoj kaj bilancoj, rilatojn kun bankoj kaj similaj instancoj. Salajronivelo inter Cr$ ... 2.400.000,00 kaj Cr$ 2.800.000,00, jare malnete. Eklaboro en Rotterdamo prefere frue en 1983. Interesitoj bv.skribi al la ĝenerala direktoro, UEA, Nw. Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam aŭ telefoni al (010) 36-1539.

### JAPANIO-ĈIUTAGA EKLUMIGO

• "La mondo nun staras en kriza punkto, sed dank' al la apero de la Savanto, nia maltrankvilo, baldaŭ malaperos". Petu informoj al: Tenmori, Kamisidami, Mirijama, Nogoja, Japanio.

### POLLANDO

• Internacia E-Klubo de Amikeco (ul. Deotymy 37 - 01-441 Warszawa, Pollando) kunligas geknabojn el la tuta mondo per vasta programo kaj propra gazeto. Oni kunlaboru kun BEJO, tiel ke ni havu en Brazilo viglan infanaron prepare al la nova jarcento de nia E-Movado.

### ITALIO

• Mitingo Por La Amikeco Inter la Popoloj (Via del Capriolo 3, I-47037, Italio) okazis en tiu urbo ĉe la Adriatika Maro, kiun partoprenis pli ol 300 mil gejunuloj, diskutintaj pri la temo "La rimedoj de la Mondo", kun debatoj je internacia nivelo fare de tutmondaj fakaj eminentuloj, inkluzive de la Papo. Oni invitas skribi por peti informojn.

• Tri poŝtmarkoj el la folklora brazila serio "Amuzaĵoj kaj Dancoj Popolaj", lanĉitaj en 1981 de Brazila Entrepreno pri Poŝto kaj Telegrafoj, gajnis en Italio la mondfaman "Prêmio Internacional Asiago de Arte e Turismo na Filatelia". Desegnataj de Jô de Oliveira - plastika artisto naskiĝinta en Pernambuco sed enradikiĝinta en Brazilio -, la tri artaĵoj "Caboclinhos", "Marujada" kaj "Reisado" reprezentas kulturajn manifestaciojn de niaj karaj gefratoj el la nordoriento de Brazilo.

### LASTHORE

• Ie ni aŭdis pri definitiva transloĝiĝo de D-ro Victor Sadler al Brazilo, ĝis junio 1983. Ĉu la ĝenerala direktoro de Universala Esperanto-Asocio venos por venontjare edziĝi aŭ por starigi oficejon de UEA en nia ĉefurbo?



## NOVA POETO EKBRILAS INTER NI

La 27an de aŭgusto pasinta, mi ricevis de Nelson Pereira de Souza leteron samtempe adresitan per kopio al diversaj liaj amikoj, kies tekston mi transskribas malsupre:

"Hieraŭ vespere (ĉirkaŭ la 22a horo) mi faradis kontrolon de la adresaro de BKE; ĝi estis praktika laboro, kaj mi tute ne pensis pri poezio. Tiam subite venis al mia penso la unua verso. Mi ĝin transskribis kaj la ceteraj tuj venis tre facile en kelkaj minutoj. Mi kredas, ke ĝi ne estas mia; sed la titolon kaj sian nomon la aŭtoro ne donis al mi. Kion vi opinias?

*El Brazilio venas novo voko*
*Al la brazila esperantistaro:*
*Ke ni kuniĝi kvazaŭ forta roko*
*Por la starigo de vigla frataro.*
*For la disputoj! Estu nobla sento*
*Inter brazilaj la esperantistoj.*
*Ĉiuj diskutoj en interkonsento*
*Fariĝos kiel ĉe idealistoj.*
*Ne plu kvereloj; nun amo kaj fido*
*Jam regos inter pacaj batalantoj,*
*Kiuj nur celas al bon' de l' homaro.*
*Jam estas tempo - feliĉo kaj rido!*
*Floras Movado por la esperantoj*
*Venontaj al la Jubile-Centjaro.*

*Vin brakumas, Nelson Pereira de Souza"*

Kian alian opinion pri la aŭtoreco de la supraj versoj mi povas havi ol tiu, kiu konvinkas min, ke Nelson Pereira de Souza estas ja la sola verkinto de tiu belega soneto? Tamen, fariĝas necese karigi, ke al tiu konkludo forte kontribuis aliaj originalaj poeziaĵoj ellaborintaj de la fekunda kreo-povo de tiu denaska poeto, en kies vejnoj torentas inspiroj, kiujn li mem baldaŭ ne plu sukcesos subpremi. Ni atendu!

Berenice K. Eliot

## BULTENOJ PERDITAJ

Kolektanto de BKE-Bultenoj perdis la numerojn 28 kaj 31 (jaro 1977) kaj n-ron 50 (jaro 1980). Se iu leganto povas disponigi ilin, bonvolu sendi al zorgo de nia Prezidanto, en São Paulo. Dankon!

## DELEGITA RETO DE BKE

Laŭ statutŝanĝo okazinta en decembro 1981, nomiĝas nun Delegitoj ĉiuj malnovaj reprezentantoj de nia Asocio, tiam konataj kiel Vicprezidantoj de BKE.

Tamen, la plej grava modifo en la statuto koncernas la malfermon de nia Organizaĵo al ĉiu izolita homo, kiu povas nun fariĝi individua membro de BKE, kontraŭ pago de malalta jarkotizo. Sekve, ĉiu malnova Vicprezidanto, por konservi sian delegitecon dum la venonta jaro devas, kompreneble, oficiale aniĝi kiel individua membro en 1983. Tial, ka estraro esperas, ke ĉiu Delegito ankoraŭ nealiĝinta al BKE, reguligu sian situacion kiel eble plej baldaŭ.

2 x 2

BRAZILA KONSILANTARO
DE ESPERANTO
SCS - Edifício Jockey Club, s/103
70300 Brasília - DF
DELEGITO

D-ro MODESTO BELMONTE DE ABREU

rajtas reprezenti la Asocion laŭ Art.º 15º.
de la Statuto aprobita en 02/11/81

Prezidanto:

Por la kuranta jaro, estas en normala situacio la jenaj Delegitoj, al kiuj ni jam sendis taŭgan identigan karton, laŭ la supra modelo: D-ro Alberto Flores, Amaro Pinagé Soares, Antonieta Almada Miranda, Antônio de Pádua Soares, Délio Pereira de Souza, Prof. Euclides Carneiro da Silva, Prof. Euclydes Geraldiz de Carvalho, Ezequias Raimundo Alves, Francisca Martos, Francisco Alves Mata, Francisco Rodrigues de Moraes Sobrinho, Majoro Gilberto A. Silva Velho, Hersila Valverde, D-ro Hugo Foscolo, Engº. Ivo Sanguinetti, Ivon Barbosa, Prof. J. M. Mabesoone, José Dias Pinto, Prof. José Passini, José Saraiva Matos, D-ro Lacorday Andrade, Manoel Borges dos Santos, D-ro Modesto Belmonte de Abreu, Orlando José Lopes Jr., Prof. Paulo Amorim Cardoso, Salvador Raymundo, Waldir Lisboa Rocha, Prof. Walter Augusto Francini, Wanderley Peres kaj D-ro Wilson P. Deslandes.



## EL LA GAZETARO

● ZERO HORA - ĉiutaga ĵurnalo en Porto Alegre (RS), publikigas tutan paĝon pri la laboro de s-ano Ivo Sanguinetti kaj por ka gaŭĉaj tradicioj kaj por Esperanto.
● MUNDO ESPÍRITA - el Curitiba-PR, informis pri la XV Brazila Seminario kaj pri la II Sudbrazila Renkontiĝo.
● COMPANHEIRO DA PAZ (C. Postal 1075 - 20000 R.Janeiro - RJ) estas oficiala organo de Universala Ĉeno por la Paco, kiu agnoskas la uzadon de Esperanto.
● TRIBUNA SULINA, el Tubarão (SC), publikigis grandan raportaĵon pri la II Sudbrazila Renkontiĝo.
● VANGUARDA DE BRASILIA (Palácio do Comércio - 70318 Brasília-DF), oficiala organo de la Komerca Asocio, aperigas noton el parolado de D-ro Newton Rossi la Patrono de la III Kongreso - en kiu li reliefigas la konstaton, kiun li faris en Miami pri la progreso de Esperanto en tiu urbo.
● A TRIBUNA - el Santos (SP), publikigis delatan raporton de nia Honora Prezidanto F.S.Almada pri la 67ª UK okazinta en Antverpeno.
● JORNAL DE SERRA NEGRA, el la samnoma urbo, aperigis diversajn notojn pri la E-Movado verkitajn de nia senlaca Delegito Silva Velho.
● EVOLUÇÃO ofte diskonigas nivaĵojn pri "Valo de Paraibo", tre dense loĝata regiono en ŝtato San-Paŭlo, kie la movado ege progresas lastatempe.
● FOLHA - el la urbo Caçapava - SP, kie loĝas s-ano Silva Velho, regule aperigas notojn pri Esperanto.
● SÍNTESE, gazeto apartenanta al União dos Professores Públicos Estaduais do Rio de Janeiro (Rua La Salle nº 22, Niterói), en sia n-ro 35 aperigas artikolon pri la "Ĉambro de Deputitoj kaj Esperanto", subskribitan de D-ro Joaquim do Couto, advokato, individua membro de BKE kaj Fakdelegito de UEA pri skoltismo.
● BOLETIM INFORMATIVO kaj O ESPÍRITA FLUMINENSE, respektivaj oficialaj organoj de Grupo Espírita Francisco de Assis (Rua Djalma Dutra 28, Niterói) kaj de Federação Espírita do Estado do Rio de Janeiro (Caixa Postal 287 - Niterói), regule propagandas la Internacian Lingvon, ankaŭ danke al la skriba kunlaboro de D-ro Joaquim do Couto.
● IMPACTO, jurnaleto apartenanta al la "Societo Etiene Ferreira Rocha", de Salvador (BA), en la numero maio/junio-82 aperigas poemoforman mesaĝon de Andreo Ludoviko, kun esperanta traduko de nia Delegito, S-ano José Saraiva Matos.

## CARLOS HENRIQUE DIONÍSIO

Subskribitan de D-ro Modesto Belmonte de Abreu, ni ricevis de Esperanto-Societo de Porto Alegre jenan leteron: "Kun profunda bedaŭro por ni kaj por la internacia E-movado, ni komunikas al vi ke je la 15a de oktobro forpasis en São Leopoldo (RS) la karmemora instruisto Carlos Henrique Dionísio, veterana kaj sindediĉa esperantisto, fondinto de Esperanto Societo de São Leopoldo, aktiva ano de Universala Esperanto Asocio kaj partoprenintо de diversaj internaciaj kongresoj de Esperanto. Krome li estis sekretario de Esperanto-Societo de Porto Alegre".

La Redakcio aldonas, ke la forpasinto estis 40-jara amiko de la Prezidanto de BKE, organizaĵo al kiu li apartenis kiel individua membro, kaj kiun li malavare helpis dum la kampanjo celanta la aĉeton de nia sidejo.

Bonkora homo, sindediĉanta al Esperanto kun la sama amo dediĉata al la multnombra familio, la forpaso de Carlos Henrique Dionísio estas neriparebla perdo ankaŭ por la tuta esperantistaro.

Ripozu li en paco kaj Dio gardu lian animon!

## UTILAJ INFORMOJ PRI BKE-KONGRESO

### KONGRESDOMO

Konstruaĵo apartenanta al Lernejo SENAC/preskaŭ en la urbo-centro, malantaŭ la preĝejo Dom Bosco.

### LOĜADO

**Amasloĝejo** - Disponebla senpage, ĉe Academia da Polícia Militar, en la fino de Avenuo W-3, suda parto.

**Pensiono Familiara** - Bonkvalita gastigado, kun kompletaj manĝoj, po Cr$ ...... 2.500,00 ĉiu persono loĝanta en dulita aŭ plurlita ĉambro.

**Alvorada Hotelo** - Tristela kategorio, plej prosima al la kongresdomo. Kosto de tranokto en komforta apartamento kun privata banĉambro:

1 persono en trilita ĉambro - Cr$ 2.695,00
1 persono en dulita ĉambro - Cr$ 3.382,00
1 persono sola en la ĉambro-Cr$ 5.800,00

Adreso: Setor Hoteleiro Sul, fone: (061) 225-3050

### LOĜADREZERVO

Interesitoj kontaktu la Lokan Organizan Komitaton (LOK) skribe aŭ pertelefone, laŭ adreso de BKE-sidejo, en Brazilio.

### TEATRAĴO

La unuan fojon en la arta historio de nia ĉefurbo ni provos prezenti la faman teatro-verkon "La Festeno de la Kardinaloj". Plej grave: oni ĝin prezentos en Esperanto.

### ĜENERALA PROGRAMO

Aparte, LOK ĝin sendos al ĉiuj enlandaj esperantistoj, laŭ nia adresaro.

## MONDONACOJ RICEVITAJ

Dank' al Dio, multaj gesamideanoj komprenas, ke BKE ne povus eldoni regule sian Bultenon sen intermeto de tiu mistera objekto, kiu nomiĝas mono. Por kono de niaj legantoj, ni danke registras la monhelpon venintan lastatempe de la subaj bonkoraj homoj:

| | | |
|---|---|---|
| Leila Mattar | Cr$ | 800,00 |
| Aymoré Vaz Pinto | Cr$ | 800,00 |
| Chersoneso Galvão | Cr$ | 2.000,00 |
| Carlos F. Costa Pinho | Cr$ | 800,00 |
| Joaquim de Carvalho | Cr$ | 800,00 |
| Alberto Guedes Curopos | Cr$ | 800,00 |
| Anonimulo | Cr$ | 6.000,00 |
| Américo Amaro de Pina | Cr$ | 500,00 |
| Anonimulo | Cr$ | 52.000,00 |
| Antonieta Almada Miranda | Cr$ | 1.000,00 |
| Carlos H. Dionísio | Cr$ | 1.800,00 |
| Cláudio Zimmermann | Cr$ | 2.000,00 |
| Francisco S. Almada | Cr$ | 2.500,00 |
| Jorge das Neves | Cr$ | 800,00 |
| José Pauluk | Cr$ | 2.000,00 |
| Maria Júlia J.R. Cunha | Cr$ | 800,00 |
| Noemi Lara Coutinho | Cr$ | 600,00 |
| Lauro Jorge Oliveira | Cr$ | 1.156,00 |
| Helmuth Schenk | Cr$ | 1.210,00 |
| Wilma M. Schenk | Cr$ | 812,00 |
| Salvadyze A.F. Souza | Cr$ | 840,00 |
| Guiomar Afonso | Cr$ | 350,00 |
| Antonio João F. Padilha | Cr$ | 350,00 |
| Edson L. R. Amorim | Cr$ | 350,00 |
| Edmundo Paschoal Spina | Cr$ | 800,00 |
| José Cecílio Carvalho | Cr$ | 300,00 |
| José A. Ano Bom | Cr$ | 800,00 |
| Erondina G.M. Tirintan | Cr$ | 500,00 |
| Lannoy Dorin | Cr$ | 1.000,00 |
| Ivon Barbosa | Cr$ | 3.800,00 |
| Mário R. F. Sobrinho | Cr$ | 300,00 |
| Maria E. A. Gadelha | Cr$ | 840,00 |
| Francisco J. S. Portugal | Cr$ | 800,00 |
| Mauro L. da Fonseca | Cr$ | 300,00 |
| Orlando J. Lopes Jr. | Cr$ | 1.000,00 |
| Gilberto A. S. Velho | Cr$ | 1.500,00 |
| Gomercindo D. Nunes | Cr$ | 2.800,00 |
| Newton F. Barros | Cr$ | 300,00 |
| Jose Roiz Oliveira | Cr$ | 2.000,00 |
| Antonio Souza Barbosa | Cr$ | 800,00 |



Centro de Cópias Cerqueira Compôs e Imprimiu